LA 8A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ
OKAZOS ĈI-JARE

Kun granda plezuro mi transdonas belan informon, ke la organizantoj de la 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj decidis organizi ĝin ĉi-jare. La kronvirusa pandemio malebligis organizadon de la kantfestivalo je ĝia ĝisnuna formo. Tial ĝi okazos **RETE** kaj kun speciala dediĉo al **MILA VAN DER HORST-KOLIŃSKA**, kiu de komenco de la festivalo subtenis ĝian disvolvon.

Tiu nova formo, reta, ebligos partoprenon al pli granda nombro de personoj, kiuj ĝisnun ĉefe pro financoj ne povis en ĝi partopreni. Sufiĉas nur aliĝi kaj poste sendi filmeton kun kanto. Ĉi-jare estos tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. registrita en studio. La aĝkategorioj estas la samaj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. Ĉi-jare sufiĉas **kanti nur unu kanton en Esperanto.** La ĵurio, la aro da internaciaj specialistoj – esperantistoj kaj muzikistoj – ĉi-jare pro escepta situacio pritaksos ĉefe lingvan kaj muzikan korektecojn.

Anonco de la rezultoj kaj disdono de la premioj al la distingitaj partoprenantoj **okazos la 12-an de septembro**, ankaŭ interrete, dum la Koncerto de Premiitoj.

Honoran patronecon pri la konkurso akceptis Jacek Sutryk - la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), EUROKKA (fakasocio de TEJO kaj muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo) kaj JUNA AMIKO (la plej konata kaj ŝatata revuo de Esperantujo) kaj VARSOVIA VENTO (interreta radio).

La organizanto, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej) invitas ĉiujn partopreni en la 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Bonvolu sendi vian aliĝilon kaj filmeton **ĝis la 15a de aŭgusto 2020 – ATENDAS VIN MULTAJ BELEGAJ PREMIOJ!**

Ĉiuj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640, www.ecem.com.pl / https://www.facebook.com/efekantoj/

Je la nomo de la organizantoj
Małgosia Komarnicka
Ĝenerala direktoro de
Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj